




Boletín

n° 418 Aprilo - Junio □ 2017



Asociación de utilidad pública

FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 418

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun per-
meso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):

admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondiĝo)

Estraro

Prezidanto: José Antonio del Barrio

Vicprezidanto: Ángel Arquillos López

Sekretario: Águeda Biurrun

Kasisto: Rosa López

Voĉdonantoj: Eduardo Berdor

Raúl Martínez

Alejandro Escobedo (prezidanto
de Hejs)

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8397

Salutvortoj

Karaj amikoj:

Tiu ĉi *Boletín* alvenas al viaj manoj ĝuste antaŭ la Ĝenerala Kunveno de nia asocio, kiu estos celebrata dum la 76-a Hispana Kongreso de Esperanto en Teruelo, la 24an de junio. Do, kiel kutime, vi trovos la necesajn dokumentojn kiujn la membroj devos trakti kaj eventuale aprobi. Ni esperas ke vi legos ilin kun detalo, malgraŭ ilia necese burokrata karaktero.

Sed ni esperas ĉefe ke ni havos la okazon diskuti ilin surloke, ne nur ĉar tiel ni povos ĝui vian ĉeeston en la Ĝenerala Kunveno, pri kio ni kompreneble tre ĝojos, sed ĉar tiama- niere vi mem povos ĝui Kongreson kiun ni anticipe konsideras ege altira. En la momento verki tiujn ĉi liniojn jam 120 homoj aliĝis al la evento, kaj do ni atendas ke la fina partopreno estos same sukcesa kiel tiu pasintjara.

La urbo Teruel meritas viziton per si mem, kaj ni havos okazon ĝin traĝui, akompanataj de amikoj kiuj ĝin funde konas. Same, ni havos ŝancon viziti la apudan urbon Albarra- cín, pri kiu eble vi multe aŭdis, sed kiu probable tre surprizos vin.

La organizantoj pretigis tre interesan progra- mon, kulturen, institucian, turisman kaj dis- tran, en kiu ĉiu el vi trovos erojn por ĝui. Ni havos belan muzikon, plurajn tre interesajn novajn librojn, klerigajn prelegojn, prezen- tojn de aktivaĵoj. Por tiuj kiuj povos resti pli longe, ni pretigis pli trankvilan sed same ĝuindajn kromkongresajn aktivaĵojn.

Dum tiu ĉi jaro oni kunmemoras du gravajn datrevenojn: la 800an de la legendo de la Amantoj de Teruelo, kaj la 100an de la for- paso de Dro. Zamenhof. Ambaŭ havos lokon en nia programo. Nepre venu, vi renkontos kelkajn tre agrablajn surprizojn. Festo kiel tiu ĉi ne facile ripetiĝos.

José Antonio del Barrio Prezidanto de HEF

ENHAVO

Salutvortoj	1
Asamblea General Ordinaria	3
Ordinara Ĝenerala Kunsido	4
Kontoj 2016	5
Raporto pri Aktivajoj 2016	7
Presupuestos 2017	12
Pri Grupoj kaj Asocioj	13
Programo de la 76-a Hispana Kongreso de Esperanto	18
Nova reta formato de Boletín	21
Nekrologe	21
Esperanto en la Hispana Parlamento	22
Esperanto en gazetaro	23
Junuloj aktivaj	24
Daŭrigo de <i>Industrioj kaj Andanzas de Alfanhui</i>	25
Levante (Raporteto de Saed Abbasi el Irano)	28
Dua parto de la prelego de Mati Montero	30

Foto sur la ĉefpaĝo: ĝenerala vido de la malnova urbeto Albarracin

POR 0,50 € MÁS
La Paga
3.000 € AL MES
DURANTE 25 AÑOS

DR. L.L. ZAMENHOF
(1859-1917)
Iniciador del esperanto

8 AGO. 17

★ 1,50 €

ONCE

Kiel ni anoncis en pasintaj numeroj, la Nacia Organizaĵo de Hispanaj Blinduloj (ONCE) dediĉos la loteribileton de la 8a de aŭgusto al Dro. Zamenhof, okaze de la centjariĝo de lia forpaso. Jen la bildo kiun ili uzos por tiu bileto.

ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA

El Presidente de la Federación Española de Esperanto (HEF) les invita a asistir a la Asamblea General Ordinaria, que tendrá lugar el sábado 24 de junio de 2017, a las 9:30 horas (a las 10:00 en segunda convocatoria) en el Campus de Teruel de la Universidad de Zaragoza, en la calle Ciudad Escolar, s/n, de la localidad de Teruel, con el siguiente orden del día:

- 1.- Lectura y aprobación del acta de la anterior asamblea (3 de julio de 2016, publicada en *Boletín* nº 414)
- 2.- Aprobación de las cuentas y tesorería del 2016.
- 3.- Aprobación de la memoria de actividades de 2016.
- 4.- Aprobación del presupuesto para 2017.
- 5.- Cuotas para 2018
- 6.- Informe sobre los socios.
- 7.- Modificaciones en la directiva de la asociación
- 8.- Proyectos para 2017 y 2018
- 9.- Ruegos y preguntas

IMPORTANTE: Los miembros de la Federación que deseen ser representados por algún otro socio, por favor que envíen un mensaje comunicándolo, indicando claramente el nombre completo del representante y representado, al buzón electrónico admin@esperanto.es o bien por correo postal a las oficinas de la asociación, antes del 19 de junio.

ORDINARA ĜENERALA KUNSIDO

La Prezidanto de HEF alvokas vin ĉeesti Ordinaran Ĝeneralan Kunsidon, kiu okazos la 24-an de junio de 2017 (sabate), je la 9:30 horo (je la 10:00 horo dua alvoko), en la *Campus* de Terŭelo de la Universitato de Zaragozo, strato Ciudad Escolar, s/n, Terŭelo, laŭ la jena tagordo:

- 1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la pasinta kunveno (je la 3a de julio 2016, aperinta en *Boletín* n-ro 414)
- 2.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2016
- 3.- Aprobo de la Raporto pri aktivaĵoj de 2016
- 4.- Aprobo de la buĝeto por 2017
- 5.- Kotizoj por 2018
- 6.- Informo pri la anaro
- 7.- Modifoj en la estraro de la asocio
- 8.- Projektoj por 2017 kaj 2018
- 9.- Sugestoj kaj demandoj.

GRAVA RIMARKO: La membroj de HEF, kiuj deziras esti reprezentataj fare de iu alia membro, bonvolu transdoni mesaĝon informante pri tio, klare indikante la kompletan nomon de la reprezentanto kaj de la reprezentato, al HEFa retpoŝta adreso admin@esperanto.es, aŭ per ordinara poŝto al la oficejo de la asocio, antaŭ la 19a de junio.

La Prezidanto de HEF
José Antonio del Barrio Unquera

KONTOJ 2016

BALANCE DE SITUACIÓN

<u>ACTIVO</u>	<u>2016</u>	<u>2015</u>
A) ACTIVO NO CORRIENTE	62.390,91	62.390,91
II. Inmovilizado material	62.390,91	62.390,91
1. Terrenos y construcciones	60.101,21	60.101,21
211. Construcciones	60.101,21	60.101,21
2. Otro inmovilizado material	2.289,70	2.289,70
232. Biblioteca	2.289,70	2.289,70
B) ACTIVO CORRIENTE	41.663,16	39.249,09
II. Existencias	3.026,70	2.222,04
1. Comerciales	3.026,70	2.222,04
300. Libros y material diverso	3.026,70	2.222,04
III. Usuarios y Deudores Varios	1.098,00	33,00
3. Patrocinadores, Afiliados y Otros Deudores	1.098,00	33,00
447. Socios	1.098,00	33,00
VII. Efectivo y otros activos líquidos equivalentes	37.538,46	36.994,05
1. Tesorería	37.538,46	36.994,05
570. Caja, euros	16,11	52,99
572. Cuenta en UEA	2.438,44	1.671,80
572. Bancos e instituciones de crédito c/c vista,	35.083,91	35.269,26
euros		
TOTAL ACTIVO	104.054,07	101.640,00

<u>PASIVO</u>	<u>2016</u>	<u>2015</u>
A) PATRIMONIO NETO	103.869,15	101.608,00
A1) Fondos propios	103.869,15	101.608,00
I. Capital	101.680,76	101.680,76
101. Fondo Social	101.680,76	101.680,76
V. Resultado de ejercicios anteriores	-72,76	-637,63
121. Resultados negativos de ejercicios anteriores	-72,76	-637,63
VII. Resultado del ejercicio	2.261,15	564,87
129. Resultado del ejercicio	2.261,15	564,87
C) PASIVO CORRIENTE	184,92	32,00
V. Acreedores comerciales y otras cuentas a pagar	184,92	32,00
3. Acreedores varios	184,92	32,00
410. Acreedores por prestaciones de servicios	184,92	32,00
TOTAL PATRIMONIO NETO Y PASIVO	104.054,07	101.640,00

CUENTA DE PÉRDIDAS Y GANANCIAS

	<u>2016</u>	<u>2015</u>
1. Ingresos Afectos a la Actividad	17.618,56	7.762,56
b) Prestaciones de servicios (<i>Venta de libros, Camisetas, Cursos...</i>)	702,80	636,40
c) Ingresos de Gestión Corriente (<i>Cuotas y Congresos</i>)	16.915,76	7.126,16
4. Aprovisionamientos	-304,66	434,77
a) Consumo de mercaderías (<i>Libros</i>)	-304,66	434,77
5. Otros Ingresos de la Actividad	5.395,44	106,00
b) Subvenciones, Donaciones y Legados	5.395,44	106,00
7. Otros Gastos de la Actividad	21.063,01	6.868,92
a) Servicios Exteriores	21.063,01	6.868,92
a2) <i>Reparaciones y Conservación</i>	-	540,54
a5) <i>Primas de Seguros</i>	121,70	112,63
a6) <i>Servicios Bancarios y Similares</i>	248,96	267,07

a7) <i>Publicidad, Propaganda y Relaciones Pùblicas</i>	18.809,73	4.218,10
a8) <i>Suministros</i>	271,57	226,33
a9) <i>Otros Servicios</i>	1.611,05	1.504,25
b) <i>Tributos</i>	-	0,00
A.1) RESULTADO DE LA ACTIVIDAD	2.255,65	564,87
14. Ingresos Financieros	5,50	0,00
b2) <i>De Instrumentos Financieros en Terceros</i>	5,50	0,00
15. Gastos Financieros	-	0,00
b2) <i>Por deudas con terceros</i>	-	0,00
A.2) RESULTADO FINANCIERO	5,50	0,00
A.3) RESULTADO ANTES DE IMPUESTOS	2.261,15	564,87
A.4) RESULTADO PROCEDENTE DE OPERACIONES CONTINUADAS	2.261,15	564,87
A.5) RESULTADO DEL EJERCICIO	2.261,15	564,87

RAPORTO PRI AKTIVAĴOJ 2016

1. INTERNA ADMINISTRADO

1.1. La estraro kunsidis 6 fojojn.

1.2. Okazis du ĝeneralaj kunvenoj, unu el ili ordinara en la sidejo (Madrid), la 17an de aprilo, por aprobi kontojn kaj raporton 2015, kaj alia eksterordinara dum la Hispana Kongreso 2016 en Herrera del Duque, la 7an de julio, por elekti novan estraron inter aliaj aferoj.

1.3. Dum la Eksterordinara Ĝenerala Kunveno estis renovigita la estraro pro fino de la mandatperiodo. La nova estraro (2016-2020) estas: Prezidanto, José Antonio del Barrio; Vicprezidanto, Ángel Arquillos; Sekretario, Águeda Biurrun; Kasisto, Rosa López, Voĉdonantoj, Eduardo Berdor, Raúl Martínez kaj Alejandro Escobedo (ĉi-lasta ankaŭ Prezidanto de HEJS).

1.4. Oni eldonis kvar numerojn de *Boletín* (413, 414, 415 kaj 416).

1.5. Biblioteko *Juan Regulo Pérez*: Ĝi daŭre estas alirebla de ĉiuj, tamen nur HEF-anoj rajtas prunt-preni.

1.6. Bitoteko: Dum 2016 oni aldonis pli da materialo.

1.7. Daŭris la sendado de la “Bitbulteno”, informilo sendata restpoŝte al la anaro kaj aliaj interesatoj. Ĝi estas dulingva (hispana kaj esperanta), kaj la nunaj ricevantoj estas pli ol 800.

1.8. HEF-retpaĝo: dum 2016 ĝi ricevas proksimume 2000 vizitojn semajne.

1.9. Sociaj retoj: HEF kaj HEJS havas kontojn en *Facebook* (1300 ŝatantoj) kaj *Twitter* (850 sekvantoj), kiuj estas regule uzataj por disvastigi informojn pri aktivajtoj kaj pri E-o. Oni aldonis pliajn videojn al la kanalo de HEF en *Youtube* (entute la filmetoj de la kanaloj jam estis spektitaj pli ol 70.000 fojoj). Ankaŭ funkcias diskutkanalon en *Telegram*.

2. ASOCIOJ

2.1. Estis fondita dum majo la loka asocio “Liberanimo” en Teruelo, kiu zorgos pri la organizado de la Hispana Kongreso de 2017 en tiu urbo.

3. INSTRUADO

3.1. Membroj de HEF gvidis kursojn en kelkaj urboj tra la tuta ŝtato.

3.2. Unu membro de HEF daŭre studas la Interlingvistikajn Studojn de la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando kaj komencis ankaŭ la Instruistan Trejnadon (projekton de la UAM, ILEI kaj edukado.net).

3.3. Dum la Hispana Kongreso 2016 okazis AMo-Seminario (Seminario por Aktivula Maturiĝo), sponsorita de UEA.

3.4. La 26an de oktobro estis lanĉita la kurso de Esperanto por hispanlingvanoj en la retpaĝo kaj apo *Duolingo*, unu el la disvolvigoj de la kurso estis la prezidanto de HEJS, Alejandro Escobedo.

4. KONGRESOJ

Organizitaj de HEF aŭ ties aliĝintaj asocioj

4.1. La 75a Hispana Kongreso okazis en Herrera del Duque (Ekstremaduro), inter la 30a de junio kaj 4a de julio. Partoprenis ĉirkaŭ 150 homoj. Ĝi estis tre sukcesa evento kun granda kvanto de alkvalitaj programeroj. Okazis antaŭkongreso en Madrido inter 27a kaj 29a de junio: la 27an, promenado tra la historio de Madrido. La saman tagon en Alcorcón (Madrid) la kongreso estis prezentita en la Agrupación Extremeña de Alcorcón. La 28an, *Bohemia nokto*, promenado en Madrido, kaj la 29an, promenado tra la mezepoka Madrido.

4.2. 24a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo en Cambrils (Katalunio), 1a-9a oktobro.

4.3. 20a Andaluzia Kongreso, inter la 29a de oktobro ĝis 1a de novembro, en Antequera.

4.4. E-asocioj apartenantaj al HEF festis la Zamenhofan Tagon tra la tuta ŝtato dum la dua semajno de decembro.

Partoprenataj de membroj de HEF

4.5. 101a Universala Kongreso en Nitra (Slovakio), inter la 23a kaj 30a de julio, Ángel Arquillos agis kiel B-Komitatano de HEF kaj zorgis pri la budo de HEF en la Movada Foiro. Moto: “Socia justeco-lingva justeco”.

4.6. 89a SAT-Kongreso en Herzberg-am-Harz (Germanio), inter la 16-an kaj 23-an de julio.

4.7. 83an Itala Kongreso de E-o en Frascati, inter la 20a kaj 27a de aŭgusto.

4.8. 32a ARKONES en Poznano (Pollando) inter la 23a kaj 25a de septembro, kie la membro de HEF Félix M. Jiménez Lobo prezentis la elektronikan eldonon de la traduko al Esperanto de *La ingenia hidalgo Don Quijote de la Mancha*.

5. DISVASTIGO

5.1. 26a de januaro: Presentado de Esperanto ĉe la oficiala lingvo lernejo de Fuenlabrada (Madrido), kelkaj membroj de HEF parolis pri la historio de la lingvo kaj skizis ties gramatikon.

5.2. 16a de marto: Presentado de E-o ĉe la lernejo San Luis Gonzaga (Majadahonda, Madrido), fare de la prezidanto de HEJS Alejandro Escobedo.

5.3. 19a de marto: presentado de *Bohemia Lumoj* pere de legado de la sceno dekdua en la teatro KubikFabrik (Kvartalo Usera, Madrido).

5.4. La prezidanto de HEF José A. del Barrio partoprenis en la (ne-esperanta) Konferenco pri Socia Historio (angle, *European Social Science History Conference*), kiu okazis en Valencio inter la 30a de marto kaj la 2a de aprilo. La konferenco disvolviĝis tute en la angla, kaj en tiu lingvo la prezidanto de HEF prezentis la komunikon “Sennaciismo, ĉu nun aŭ en la estonto: dilemo por Esperanto-parolantoj anarkiistoj”.

5.5. Tradicia legado de *Don Kihoto* dum la Internacia Tago de la Libro (23a de aprilo) en Madrido (Círculo de Bellas Artes): du esperantistoj legis paragrafojn de la esperanta traduko de la verko.

5.6. 24a de aprilo: Miguel Fernandez, Jorge Camacho kaj aliaj partoprenis en la Deklamado de poezio en esperanto en la kvartalo San Fermin (Madrido) okaze de la tago de la libro, kadre de la kulturifesto organizita de la Kvartala Asocio de loĝantoj pro la aprobo de la konstruo de publika biblioteko en tiu kvartalo. Oni prezentis la libron *Nova mondo en niaj koroj*. Ĉeestis ankaŭ hispanlingvaj poetoj kiel Maria Angeles Maeso, Antonio Crespo Massieu kaj Alberto Garcia -Teresa.

5.7. Semajno de Eo en Teruel: inter la 3a kaj 6a de majo okazis du prelegoj (de la prezidanto José A. del Barrio kaj de la loka aktivulo Alberto Granados) plus unu ekspozicio de paneloj en la Oficiala Lernejo pri Lingvoj.

5.8. Miguel Fernández prezentis la verkon *Bohemiaj lumoj* ene de kultura okazaĵo JA-CA (Jornadas de Arte y Creatividad Anarquistas / Renkontiĝoj pri Anarkiismaj Arto kaj Kreivo) la pasintan 14an de majo, en centro uzata de liberecanaj grupoj por kulturaj aktivadoj, EKO en Karabanĉelo

5.9. Prelego la 25an de majo en la Oficiala Kolegio de Kuracistoj de Sevilo kaj Sevila Societo de Kuracistoj, Verkistoj kaj Artistoj “Nicolas Monardes” fare de la prezidanto de la Sevila E-o Asocio José Roldán.

5.10. Ene de la somera kurso “En la limoj de la lingvaĵo: artaj lingvoj kaj komunikaj fikeoj” de la Universitato de Ekstremaduro, kiu okazis inter la 11a kaj 12a de julio en la Instituto pri modernaj lingvoj de Kazereso, la prezidanto José A. del Barrio prelegis pri helpaj lingvoj.

5.11. 26a de septembro: kolokvo dum la Eŭropa Tago de la Lingvoj en la sidejo de la asocio.

5.12. 4a oktobro: Legado de *Don Quijote* fare de blinduloj en ties denaska lingvo, komencante per Esperanto. Organizita de Pedro Zurita.

5.13. La 15an de novembro Miguel Fernández deklamis poeziojn en E-o en la Libro-vendejo “La Central” (Madrido) okaze de la prezento de la poezirevuo “Caja de resistencia”, kies unua numero enhavas poezion en Esperanto de Suso Moinhos kaj alian de Miguel Fernández mem.

5.14. Foiro de la asocioj en Cheste, inter la 10a kaj 11a de decembro, neesperantista evento en kiu partoprenis la E-a loka asocio *Lumradio* kaj okazis prelego pri E-o, gvidata de la usona esperantisto Denis Keefe.

5.15. La 12an de decembro estis prezentita en la Nacia Biblioteko de Hispanio la libro *El Quijote universal. Siglo XXI*. Ĝi entenas pli ol cent tradukojn de diversaj ĉapitroj de la verko *Don Quijote*, kelkaj el ili unuafojaj. Inter ili troviĝas ankaŭ Esperanto. Dum la prezentado oni legis pecojn de kelkaj el tiuj tradukoj. La pecon en Esperanto legis la prezidanto de HEF.

5.16. La 15an de decembro, koincide kun la Internacia Tago de Esperanto, HEF prezentis en la centra sidejo de la Instituto Cervantes, en Madrido, la elektronikan eldonon de la traduko al Esperanto de *La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha*. La evento estis enkondukita de la direktoro pri kulturo del Instituto, Beatriz Hernanz, kaj poste okazis prelegojn de la prezidanto de HEF, de la kunordiganto de la projekto Miguel Gutiérrez Adúriz kaj de la respondeculo de la Bitoteko de HEF, Ana Manero.

6. AMASMEDIOJ

6.1. La gazetara servo de HEF sendis 12 gazetarajn komunikojn, pri aferoj diversaj, inter alie: pri la eldonado de *Bohemiaj lumoj*, pri la internacia tago de la gepatra lingvo, pri la forpaso de Umberto Eco kaj ties opinio pri E-o, pri la Hispana Kongreso en Herrera del Duque kaj pri la prezentado de la bita eldono de *Don Quijote* en Instituto Cervantes.

6.2. Sekve al tiuj komunikoj aŭ aliaj agadoj, aperis dum 2016 ĉirkaŭ 50 aludoj, notoj aŭ artikoloj pri HEF aŭ pri Esperanto en ĵurnaloj (kaj paperaj kaj retaj).

6.3. Aperis 7 informoj pri HEF aŭ pri Esperanto en diversaj radio-stacioj aŭ televidpro

gramoj, interalie en RTVE kaj Canalextramadura.

7. ALIAJ AKTIVAĴOJ

7.1. La 22an de januaro en la madrida sidejo prelegis Sara Spanò kaj Francesco Maurelli pri trejnado de organizo-respulsuloj, eŭropaj subvencioj kaj la idearo de Zamenhof.

7.2. Projekto Don Quijote: eldono de la bita formato de la traduko de F. de Diego de Don Quijote de la Mancha. La teksto estis polurita de preseraroj kaj korektita kaj estas je la dispono de ĉiuj interesataj homoj kaj elŝutebla el interreto, ĝi ankaŭ elŝuteblas el la Biblioteca Virtual Miguel de Cervantes en elektronika formato kun kiu HEF interkonsentis pri la samtempa disponigado al la ĝenerala publiko. HEF eldonis fizikan karton, enhavantan la dosieron de la verko kaj je la dorso entenas la emblemon de la Ŝtata Komisiono por la 400-a datreveno de la morto de Miguel de Cervantes, kiu inkludis tiun ĉi agadon en sia oficiala programo kaj donis al HEF permeson por uzi la simbolon.

7.3. La Fondaĵo Antoni Grabowski donis sian duan premion (kun ekonomia subteno de 300 usonaj dolaroj) al HEF pro Bitoteko “per kiu ekde 2013 elstaraj verkoj estas facile kaj senkoste alirebligataj al la publiko – laste, okaze de la 400-a datreveno de la morto de Miguel Cervantes, *Donkiĥoto* en la traduko de Fernando de Diego”.

7.4. Belartaj Konkursoj de UEA 2016: Jorge Camacho Córdón ricevis la duan premion en la branĉo eseoj, pro “La vartisto de vortoj” kaj la unuan premion en la branĉo poezio ricevis Antonio Valén, pro “Paralele”.

7.5. Du membroj de HEF, la elstaraj verkistoj kaj tradukistoj Miguel Fernández kaj Miguel Gutierrez Adúriz estis elektitaj Prezidanto kaj Sekretario, respektive, de la skipo de gvidantoj de la Belartaj Konkursoj de UEA.

7.6. Hispanaj e-verkistoj aperigis kelkajn verkojn dum la jaro: Miguel Fernández, *La vorto kaj la vento* (Mondial), kolekto de rakontoj; Jorge Camacho, *Strangaj spikoj* (Mondial) kaj *Palestino strangolata* (Monda Socia Asembleo), poemaroj; Suso Moinhos, *Laminarioj* (Espero), poemaro.

7.7. Aktivuloj el Seviljo faris retan kanalon pri esperantlingvaj originalaj infankantoj en *You Tube*, “Babeloj filmoj”.

7.8. Augusto Casquero aperas ekde 2016 en la *Panteono*, listo de elstaraj instruistoj en la retejo *edukado.net*.

Originalo subskribita de la Sekretario María Águeda Biurrún.

PRESUPUESTOS 2017

<u>GASTOS</u>		<u>INGRESOS</u>	
<u>2. Aprovisionamientos</u>		<u>1. Ingresos Afectos a la Actividad</u>	
(Compra de libros, de material didáctico y variación de existencias)	400,00 €	Prestaciones de Servicios (Venta de libros, cursos...)	600,00 €
		Cuotas	5.800,00 €
<u>4. Otros Gastos de la Actividad</u>		<u>5. Otros Ingresos de la Actividad</u>	
Servidor y Dominios Internet	1.200,00 €	Subvenciones y Donaciones	4.000,00 €
Reparaciones y Mantenimiento	100,00 €		
Primas de Seguros	130,00 €		
Comisiones Bancarias y Similares	300,00 €		
Cuota UEA	220,00 €		
Boletín	2.800,00 €		
Otras Campañas y Publicidad	3.000,00 €		
Suministros (electricidad)	300,00 €		
Teléfono	550,00 €		
Correo	200,00 €		
Comunidad Vecinos	850,00 €		
Material Oficina	100,00 €		
Gastos Varios	250,00 €		
TOTAL GASTOS	10.400,00	TOTAL INGRESOS	10.400,00

HEF SERĈAS KASISTON

Nia kasisto Rosa López prezentis antaŭ kelkaj tagoj sian demisiön de la posteno en la estraro de Hispana Esperanto-Federacio pro personaj kaj familiaj kialoj. La posteno devos esti anstataŭigita en la venonta Ĝenerala Kunveno de la asocio en Teruelo.

Ni petas niajn anojn kandidati por tiu posteno. Konoj pri mastrumado aŭ librotenado bonvenas, sed ili ne estas la plej gravaj, ĉar, kiel ni jam anoncis en la pasinta okazo, la antaŭa kasisto, plu estrarano, Raúl Martínez pretas helpi en ĉiuj pli teknikaj taskoj.

Do, via baza tasko estos kunlabori en la ĝenerala mastrumado de la asocio. Nur volonto kaj emo helpi estas necesaj.

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

ANDALUZIO

Sevilo



La 21an de aprilo disvolviĝis en la la Fakultato pri Edukado de la Universitato de Sevilo la kurso “Esperanto kaj Sociaj Sciencoj”, organizita de komunuma grupo por aktivado, kun apogo de universitataj departementoj kaj la kunlaboro de la Sevila Asocio de Esperanto.

Prelegojn kaj atelierojn gvidis la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, kaj la

sevilaj instruistoj kaj profesoroj Juan Diego Díaz, Antonio Rodríguez kaj Vicente Manzano, organizanto de la renkonto. Krome, dum ĝi diversaj grupoj prezentis la unuajn konkludojn de la esploraj laboroj pri percepto de Esperanto per enketoj faritaj en la Universitato, kaj kiuj probable estos poste publikigataj en akademiaj medioj.

La prezidanto de HEF havis ankaŭ la ŝancon dum la antaŭa tago viziti la kurson de Esperanto organizitan de la loka grupo kaj kunvespermanĝi kun ties anoj.

Madrido

PRELEGO KAJ PLANOJ EN FUENLABRADA

La pasintan 15an de marto okazis prezentado de Esperanto en la Oficiala Lernejo pri Lingvoj en Fuenlabrada, okaze de ties “Tago de Malfermaj Pordoj”. Ĝin gvidis Juan del Castillo, kaj la titolo estis: “Esperanto, comunicación sin complejos”.

Post la bona akcepto de la prelego en tiu Oficiala Lernejo pasintjare, oni planas nun organizi kurson en tiu institucio en la venonta aŭtuno. Juan del Castillo organizas gvidinstruistan grupon por laŭvice viziti tiun lernejon po unu fojon ĉiun semajnon, solvi

dubojn, korekti tie ekzercojn kaj paroligi la kursanojn, kiuj devos trastudi la lecionojn hejme.

La 22an de marto, Juan del Castillo prelegis ankaŭ en librovendejo Aida Books, apartenanta al neregistara organizaĵo samnoma, situanta en la madrida placo Getafe numero 2. Malgraŭ la tre pluva vetero, tamen 5 bravuloj ĉeestis la eventon.

PUBLIKA ĈEESTO DE ESPERANTO EN APRILO



Diversaj aktivaĵoj okazis en Madrido en la lastaj tagoj de aprilo, en tre malsamaj cirkonstancoj kaj kun tre diversa publiko.

La vendredon, la 21an de aprilo, je la 7a ptn., tri E-poetoj, Ana Manero, Jorge Camacho kaj Miguel Fernández, grupe kun hispanlingva kolego Alberto García-

Teresa, prezentis dulingve (hispane-esperante) poezian vesperon en la madrida mem-

mastrumata kulturcentro EKO (strato Ánade, n-ro 10), kadre de la liberecarnaj kulturaj renkontiĝoj JACA3.



La sekvan tagon, kiel jam tradicie, okazis la publika legado de *Don Quihoto* en kultur-institucio Círculo de Bellas Artes, dum tri tagoj ĉirkaŭ la

Tago de la Libro. Ĉijare denove du esperantistoj kontribuis per legado en Esperanto: Darío Mora kaj Alejandro Pareja. Ilia partopreno estas spektebla en la kanalo de YouTube de MEL.



La 24-an de aprilo, oni programis debaton en la sidejo de Madrida Esperanto-Liceo, pri la temo “Kiu estas la aktualeco de la pensado de D-ro Zamenhof?” , kun partopreno de ĉ. 15 lokaj esperantistoj, kiuj diskutis liajn ideojn

kaj verkojn, la “internan ideon” de Esperanto, la homaranismon, liajn iamajn iniciatojn.

Bilbao

NOVA KURSO DE ESPERANTO

La 10-an de marto komencis en nia sidejo nova kurso de Esperanto gvidata de nia samrondano David Redondo. Al ĝi aliĝis 13 homoj, kvankam ne ĉiuj povas persone ĉeesti; tamen, 10 el ili regule partoprenas la lecionojn.


Jam de antaŭ 4 jaroj ni ne organizis kursojn; pro tio, temas pri grava okazintaĵo cele al engaĝiĝo de novaj homoj al nia Grupo.



La unuan tagon, David okazigis lunĉon por malstreĉigi la kutiman nervoziĝon de tiu unua tago kaj ekkonatigi la novulojn kun Esperanto kaj kun la E-Grupejo. Tre brila elpenso!

La lernolibro uzata en la kurso estas tiu de Miguel Gutiérrez Adúriz, kune kun lia vortaro, la nova eldono de “Amika”.

PRESENTADO DE LIBRO. Sestao




La pasintan 30-an de marto, en la urba biblioteko de Sestao, okazis la presentado de la libro “La forfuĝintoj de la fortreso de Ezkaba (San Kristobal)”. Tiu amasa forfuĝo okazis en majo 1938 kaj en ĝi elstare rolis Esperanto, tiel ke nia lingvo estis la “sekreta” lingvo uzata de la organizantoj de la fuĝo por ke la planoj ne estu malkaŝotaj de la gardistoj.

Post kunvoko pere de retroŝto, la eventon ĉeestis 5 membroj de nia E-Grupo, kiuj havis la okazon interparoli kun la ege afabla kaj simpatia aŭtoro de la libro, Fermín Ezkieta.

Mirinda estis la multnombra ĉeestantaro: inter 80 kaj 100 homoj.

Valencio

Dum pasintaj semajnoj oni ludis en diversaj teatroj de la Valenciana Komunumo la verkon “Els esperantistes” (“La esperantistoj” en la valencia lingvo), plej longe inter la 26a de aprilo ĝis la 7a de majo, en la Teatro Micalet de Valencio.



La teatraĵo, verkita de Paco Zarzoso kaj ludata de konataj aktoroj Josep Manel Casany, Ferran Gadea kaj Cristina Garcia, utiligas Esperanton kaj la esperantistan kulturon por paroli pri la homa fragileco.


La kompanio ricevis konsiladon de la Valenciana Esperanto-Asocio, kaj, inter aliaj eroj, utiligas adaptan de la konata hispana kanto “Libre”, tradukita al Esperanto fare de Liven Dek.

Diversaj valenciaj esperantistoj ĉeestis la ludadon. La 6an de majo Enric Baltasar partoprenis en malferma kolokvo de la kompanio kun la publiko.

Ankaŭ en Valencio, la 29an de aprilo, okaze de oficiala renkonto de Oficialaj Lingvolernejoj, oni programis muzikan festivalon 'MuLTiLiNGuS', t.e. koncerton kun popolaj kantoj en nombraj lingvoj, inklude de la germana, angla, japana, franca, rusa, ĝita, rumana, araba, portugala, eŭska, galega, valencia, hispana kaj Esperanto. Pri la internacia lingvo, krom la eŭska, zorgis nia kolego Garikoitz Knörr, kiu kantis pecon de la kanto “Rapide knab”.

Cheste

Ene de la artisma iniciato “Graffitea” en Cheste (Valencio), estis pentrita granda murpentraĵo (grafitio) kun teksto en Esperanto omaĝe al la esperantista pioniro Francisko Máñez, en ties iama naskiĝdomo. Pri ĝi zorgis la grupo “Cheko’s Art”, el Lecce (Italio), kun la kunlaboro de la grupo “Lumradio” de Cheste.



Aguilar de Campoo

Inter la 8a kaj 30a de majo la ekspozicio de paneloj de Hispana Esperanto-Federacio montriĝis en la publika biblioteko de Aguilar de Campoo (nordo de provinco Palencio, en regiono Kastilio kaj Leono).

La ekspozicion inaŭguris la prezidanto de la asocio, José Antonio del Barrio, per prelego en tiu loko la 8an de majo, kun ĉeesto de ĉ. 40 homoj. Ĉe la fino HEF donacis pakon da libroj al la biblioteko.



La ekspozicio estis inkludita en la iniciato “Cuentaendo que es gerundio”, organizita de la Biblioteko okaze de la Tago de la Libro.

PROGRAMO DE LA 76-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Jen la ĉefaj aktivajoj antaŭviditaj por la 76-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos inter la 23a kaj 25a de junio 2017, en la urbo Teruelo (Teruel, Aragono), inklude de diversaj programitaj por la tagoj antaŭaj kaj postaj al la evento.

ANTAŬKONGRESAJ AKTIVAĴOJ

Lundo 19 – merkredo 21, en Teruelo: aktivajoj de disvastigo de Esperanto por la loka loĝantaro.

Merkredo 21 en Madrido, 19:00 horo: prezento de la kongreso en la “Casa de Aragón” de Madrido.

Ĵaŭdo 22 en Teruelo: matene (12-13): turisma promenado (komuna vizito al la mudeĥara “Turo de la Salvadoro”) 13 h. en Placo de la Boveto (*Torico*): Inaŭguro de la ekspozicio pri Esperanto kaj Zamenhof.

Vespere, ekde 17 h: instalado de Libroservo; inaŭguro de ekspozicio, prezentado al ekstera publiko.

18,30 – 20,00: en Aŭditorio de la Universitato, Renkonto de lernantoj per la reto kaj unuafojaj partoprenantoj en Esperanto-evento.

Vendredo 23

12 – 13,30: Komuna turisma vizito al la malnova parto de Teruelo (gvidanto: Serafin Aldecoa) Ekde la 16,00, en Vestiblo de la Universitato: Akcepto de kongresanoj.

17,00 - 18,00: Lorenzo Noguero: Prelego pri Esperanto en Aragono kaj Teruelo

18,00 - 19,30: Oficiala malfermo, kun ĉeesto de la urbestro de Teruelo kaj aliaj aŭtoritatoj

19,30 – 21,00: Miguel Fernández: Prezento de “La defio vivi kaj krei”. Projekcio de la filmo “Andaluza Hundo” (“Un chien andalou”), subtekstigita de Miguel Fernández.

21,00 - 22,00 Komuna manĝado (portu frandaĵojn de via lando aŭ regiono)

22,30 - 24,00: Astronomia aktivajo organizita de ACTUEL en San Blas

Sabato 24

Ekde la 9,00: KER-ekzamenoj

10,00 - 11,00: Ĝenerala kunveno de HEF



11,00 - 12,00: Prezento de agadoj de la Jaro Zamenhof. Prezento de la libro: “La calle Zamenhof” kun ĉeesto de la aŭtoro Roman Dobrzyński.

12,00 - 12,30: Eduardo Berdor: Prelego pri ZEOj

13,00 – 14,00: Oficiala inaŭguro de la Placo Esperanto

16,00 – 17,30: Komuna vizito al la Maŭzoleo de la Geamantoj. Miguel Fernández kaj Ana Manero: Deklamado de la “Poemo al Geamantoj de Teruelo”, esperantlingve kaj hispanlingve

18,00 – 18,45: Miguel Fernández: Prezento de la libro “Tagoj kaj ruinoj”.

18,45 – 19,30: Chema Rodríguez kaj Serafin Aldecoa: Omaĝa konferenco al Francisco Azorín, kun ĉeesto de lia nepo.

19,30 – 20,30: Prelego de Viktoro Solé: Kial mi ne ŝatas la himnon de Esperanto?

Ekde 23,00 - Muzika koncerto en Fonda del Tozal, kun Martin Wiese kaj Kajto Kvarope.

Dimanĉo 25

9,30 – 11,30: Prezento de esperantistaj eventoj: Proponoj de renkontoj en la Iberia Duoninsulo en 2018, Renkontoj en Katalunio, Esperantistaj studsesioj, kaj aliaj.

12,00 – 14,00: Turisma vizito al Albarracín.

14,30 – 16,00: Bankedo kaj formala fermo de la kongreso

17,00 – 17,30: Fermín Ezkieta: Presentado de la libro “La fuĝintoj de la Monto Ezkaba”

17,30 – 18,30: Serafin Aldecoa kaj Alberto Granados: Prelego pri la Hispana Interciviltana Milito en Teruelo

19,00 – 20,30: Komuna vizito al la vestigoj de la “Batalo de Teruelo”, tra la stratoj de la urbo.

POSTKONGRESAJ AKTIVAĴOJ

Lundo 26

9,30 – 13,00: Seminario de TEJO por junuloj.

Samtempe: Seminario por aktivula maturiĝo. Prelegoj de Carlo Minnaja, Roman Dobrzyński, Agnieszka Mozer, Vicente Manzano-Arrondo, José M^a Salguero, inter aliaj.

15,00 - 18,00: Daŭrigo de la seminarioj.

Post 18:00: Turisma vizito kaj neformalaj babiladoj



Mardo 27

9,30 – 13,00: Seminario de TEJO por junuloj

Samtempe: Seminario por aktivula maturiĝo. Prelegoj de Saioa Escobar, Xavier Alcalde, Enric Baltasar, Irek Bobrzak, Miguel G. Adúriz, inter aliaj. Fermo kaj konkludoj

15,00 - 19,00: Daŭrigo de la TEJO-seminario.

NOTO: La programo povos aktualiĝi antaŭ la komenco de la kongreso.

Pliaj informoj: <http://www.esperanto.es/hef/kongreso/programo>

NOVA RETA FORMATO DE BOLETÍN

Hispana Esperanto-Federacio publikigis la antaŭan numeron (417) de tiu ĉi "Boletín" en nova formato, kiel revuo en la reto. Ne temas nur pri la pdf versio, kiu plu estas facile atingebla de la membroj de la asocio en la interna spaco de la retejo, sed pri bela formato, adaptita al la legado en la reto per ĉiuj legiloj. Vi povas ĝin aliri en la adreso: <http://esperanto.es/boletin/>

Tie vi trovos rekte la ĉefpaĝon kaj ĉefartikolon, kaj la resumon de la artikoloj. Por membroj de HEF, eblos aliri la tutan Boletín, enirante en la paĝo pere de via uzulnomo kaj pasvorto (se vi ne havas ĝin, bv. peti al la retejestro esperanto@esperanto.es)

Sed dum la unuaj du monatoj, escepte kaj kiel provo, la paĝo estas alirebla por ĉiuj interesitoj, eĉ ne membroj. Por tio, oni povas utiligi la uzulnomon kaj la pasvorton "prueba", ĉar ni deziras ke dumtempe ankaŭ aliaj esperantistoj, ne membroj de HEF, povu ĝui la revuon -- kaj eble ili tiom ŝatos ke ni konvinkos ilin fariĝi HEF-anoj...

Nun troviĝas tie la numero 417 kaj ankaŭ la 416 (en indekso "aliaj numeroj"). Temas pri la du unuaj provaj numeroj, kaj do komentoj kaj korektoj bonvenas. La novajn aperos iom post iom tie, tiel ke homoj povos alkitimiĝi al tiu nova maniero kaj povos ĝui la bultenon tuj post ĝia apero.

NEKROLOGE

FORPISIS JOSEP COLOM

La 16an de aprilo forpasis nia veterana amiko Josep Colom. Li estis 102 jarojn aĝa. Kun sia kunulino Trini García, li refondis la grupon en Sant Cugat del Vallés, al kiu ili donis la nomon "Jozefo Anglés", honore al sia longjara instruisto. Ambaŭ ricevis la premion Ada Fighiera-Sikorska dum la Internacia Semajno de 2014.

Ripozu pace



ESPERANTO EN LA HISPANA PARLAMENTO

Okaze de la celebrado en aprilo de la Tago de la Libro, la Kongreso de Deputitoj de Hispanio (la baza leĝdona ĉambro) organizis prezentadon de ekzempleroj de tradukoj de Don Quijote, donacitaj al ties Biblioteko fare de eksterlandaj ambasadoj. Post rapida kontakto de Hispana Esperanto-Federacio kun la biblioteko, la respondeculoj akceptis donacon de ekzemplero de la versio en Esperanto de la fama verko, kaj invitis nian asocion al la ceremonio.

Tiu okazis la 20an de aprilo en la plej solena salono de la Parlamentejo (la "salono de perditaj paŝoj"), kun paroladoj de la prezidanto de la hispana Parlamento, Ana Pastor, la prezidanto de ties komisiono pri kulturo, kaj la direktoro de la Reĝa Akademio de la Hispana Lingvo. Ana Pastor dum sia prelego menciis la donacon de la versio en Esperanto fare de nia asocio, kaj ĝin dankis.



Oni povas spekti la tutan ceremonion en la kanalo en Youtube de la Kongreso de Deputitoj, konkrete en la adreso: <https://www.youtube.com/watch?v=QTMTOF-cLJw>?

La danko al HEF aperas en minuto 10,20 kaj fine de la filmo eblas vidi ankaŭ la prezidanton de HEF en la salono.

Alia pli mallonga video, kun re-

sumo, troviĝas en: <https://www.youtube.com/watch?v=3S26pdX2cM>.

Tie oni vidas kiel la parlamentestro foliumas la libron kun la versio en Esperanto, kio okazis sekve al mallonga interparolo kun la prezidanto de HEF kun ŝi, kaj poste la parolisto mencias nian lingvon.

Krome, la Kongreso inkludis la informon pri la donacado en gazetarkomuniko, kiu estis republikigita en diversaj ĵurnaloj la sekvan tagon.



ESPERANTO EN GAZETARO



Dum la lastaj monatoj, ĉefe en aprilo, okaze de la datreveno de la forpaso de D-ro Zamenhof kaj de aliaj festadoj kiel la Tago de la Libro, multigiĝis la apero de Esperanto en diversaj komunikiloj. Al tio kontribuis la sendo de diversaj informoj kaj gazetarkomunikoj fare de la Informa Servo de Hispana Esperanto-Federacio. Kelkaj gazetoj mem eldonis la informon (ekzemple *Tercera Información*, *Gaceta Madrid* kaj *El Mercurio Digital*), sed plejmulto

profitis la okazon por pretigi propran raportadon.

Probable la plej disvastigata estis la apero en ĵurnalo *El Mundo*, la 14an de aprilo mem, de tutpaĝa artikolo kun malgranda alvoko jam en la ĉefpaĝo kaj video en la reta versio. La artikolo mem estis objektiva, ne propaganda, sed plej frapa estis la titolo de la reta versio: "Esperanto: utopio, fiereco kaj sukceso" (*Esperanto: utopía, orgullo y éxito*).

Ampleksa propra raporto aperis ankaŭ en *El Faro de Vigo*, la plej grava de la urbo Vigo, kun specialaj informoj pri la loka movado kaj kun intervjuoj al Suso Moinhos kaj Antonio Valén. La samregiona *La Voz de Galicia* uzis alian aliron: ili publikigis version de raporto de la agentejo *France Press*, sendita el Pollando, kiu aperis en multaj aliaj alilingvaj versioj kaj en aliaj komunikiloj en Ameriko.

Proprajn artikolojn pretigis ankaŭ *Público* kaj *Naiz*.

En socia retejo de la granda kompanio Atresmedia, *Tribus ocultas* ("Kaŝitaj triboj"), la raportistoj decidis krei iom propran ellaboraĵon, iom miksan, kun aludoj al denaskuloj kaj aliaj anekdotoj, kaj kun frapa titolo: "100 años de la lengua del amor" ("100 jaroj de la lingvo de amo").

Speciale atentinda estas la eĥo en komunikiloj de Aragono, kie oni substrekis la baldaŭan okazigon de la hispana E-kongreso en Teruelo.

Ekzemple, la programo "Escúchate" de regiona radio *Aragón Radio*, intervjuis la 17an de aprilo la prezidanton de HEF kun la partopreno de la zaragoza esperantisto Beatriz Pitarch, kio ebligis tre simpatian dialogon.

Pli atentinde, la plej grava ĵurnalo de Aragono, *El Heraldo de Aragón* publikigis, la 25-an de aprilo, ampleksan intervjuon kun la prezidanto de la Federacio, kiu aperis en tre elstara loko en la dorsopaĝo.

Fine, la ĵurnalo *Diario del Alto Aragón* de Osko/Huesca, publikigis tre ampleksan raporton pri D-ro Zamenhof en sia eldono de la dimanĉo 30-a de aprilo.

JUNULOJ AKTIVAJ

Esperanto



HEJS

Unu el la lastaj strategioj kiujn elektas la junaj Esperantistoj de la tuta mondo estas trejnado. En HEJS ni ne volis malsame agi. Tial ni, la junuloj en Hispanio, partoprenas kaj organizas okazojn en kiuj ni lernas esperante en la plej internaciaj etosoj kiu eblas. Sendube kunpartopreni en eŭropaj projekto iĝis tempomarko rilate al tiu temo.

Pro tio, fine de marto, Darío kaj Eloy vojaĝis al Belgio por lerni pri komunikado. Ĉi tiu mallonga trejnado nur dutaga estis la unua renkontiĝo de Darío kiu ekkonis dekojn de junuloj, multaj el illi adoleskuloj kaj denaskuloj. Tio okazis dum PEKO, renkontiĝo de la verdaj skoltaj,

ununura grupo de skoltaj Esperantistaj.

Carlos kaj Marina partoprenis plilonge, dum 10 tagoj en intensa trejnado por lerni kiel trejni, por iĝi TEJO-trejnistoj. Kun aliaj 15 esperantistoj el Italio, Benino, Brazilio, Pollando... partoprenis ili dum okazis la Internacia Junulara Festivalo en la nordo de Italio. Por finiĝi la trejnadon, la partoprenantoj devis prepari siajn proprajn trejnadajn. Tial ni povas aserti ke ni havas lertulon pri motivado kaj alian pri sociaj retoj kiujn ni certe vidos kunlabori kun ni en trejnadaj kaj prelegaj renkontiĝoj.



Sed en HEJS tio ne sufiĉas. Tial, ĵus post la Hispana Kongreso, ni gastigos kurson pri kampanjoj en Terŭelo, partoprenos en Eŭropa projekto pri lingvoj kaj ni organizos la IJK 2018 en Badaĥozo. Tamen tio signifas ke ni devos labori, multe, sed ni ankaŭ povos vojaĝigi novajn komencantojn kiuj eksteriros la reton por ekami la kulturon kaj homoj de la Esperanta komunumo.

Tion ni povis, povas kaj povos atingi per la kunlaboro de esperantistoj spirtjunaj kaj de aliaj asocioj kaj mondlokoj. Ni ne solas, sed ni devas ŝargi nian energion por sukcesi en pli da projektoj. Se vi volas vidi kiel ni funkcias kaj helpi, nia venonta renkontiĝo estos asambleo dum la Hispana Kongreso. Ni renkontiĝos en Terŭelo!

Carlos Pesquera Alonso


II. KIE ONI RAKONTAS KIEL TIU INFANO FUĜIS EL SIA ĈAMBRO KAJ LA AVENTURON KIUN LI HAVIS

Tiu ĉambro estis la plej malbela de la domo kaj tien venis ankaŭ la ventokoko, ankoraŭ brakumante sian karberon. Unu tagon la infano ekparolis al li, kaj la kompatinda koko, kun tordita buŝo, diris al li ke li scias multajn aferojn, ke li liberigu lin kaj li montrasion al li. Tiam ili interpaciĝis kaj la infano elprenis el li la karberon kaj rektigis lin. Ili parolis la tutajn tagon kaj nokton, kaj la koko, kiu estis pli aĝa, instruis, kaj la infano skribis ĉion en la ŝirĉemizajo. Kiam venis la patrino, la koko kaŝiĝis ĉar ili ne volis ke ŝi sciu ke ventokoko parolas.

El la altaĵo de la domo la koko estis lerninta ke tio ruĝa el la sunsubiro estas ia sango kiu elverŝiĝis je tiu horo ĉe la horizonto, por maturigi fruktojn, kaj, speciale, pomojn, persikojn kaj migdalojn. Tio estis kio plej plaĉis al la infano el ĉio kion la koko instruis al li, kaj li cerbumis kiel li povus havigi al si tiun sangon kaj pro kio ĝi utilis.

Unu tagon, kiu al la koko aspektis bona, la infano prenis la littukojn de sia lito kaj tri kuprajn marmitojn kaj li fuĝis kun la koko al la horizonto de tiu fenestro. Ili alvenis al glata altebenaĵo, en kies bordo estis la horizonto kiu videblis malproksimege el la domo, kaj ili atendis la sunsubiron kaj la elverŝon de la sango.

Iom post iom ili vidis ke venas rozkolora nuboj, poste ĉirkaŭis ilin ruĝeca nebulo kiu odoris acide, kvazaŭ je jodo kaj citronoj. Finfine la nebulo tute ruĝiĝis kaj nenio videblis, nur tiu densega lumo inter karmina kaj skarлата. De tempo al tempo pasis bendo pli hela, ĉu verda aŭ orkolora. La nebulo fariĝis pli kaj pli ruĝa, pli malhela kaj densa kaj ĝi baris la lumon, ĝis ili vidiĝis ene de skarлата nokto. Tiam la nebulo ellasis humidecon kaj tre fajnan pluvon, polvigita kaj leĝera, el sango kiu ĉion trempis kaj ĉion ruĝigis. La infano prenis la littukojn kaj ekskuis ilin en la aero ĝis ili iĝis tute ruĝaj. Poste li eltordis ilin super la kupraj marmitoj kaj li revenis kun ili al la aero por ke ili retrempiĝu. Tiele li faris, ĝis la tri marmitoj estis plenplenaj.



Tiun nokton ili dormis en kaverno, kaj la sekvantan matenon ili lavis la littukojn en rivero. La akvo de tiu rivero malpuriĝis kaj ekmaturigis ĉion, ĝis putriĝo. Trinkis grave-da ĉevalino kaj ŝi iĝis tute blanka kaj travidebla, ĉar la sango kaj la koloroj aliris al la fetu, kiu videblis tre klare en ŝia ventro, kvazaŭ ene de lanterno. La ĉevalino kuŝiĝis sur la verdaĵo kaj abortis. Poste ŝi releviĝis kaj foriris lante. Ŝi estis tute kvazaŭ vitra, kun blanka skeleto. La abortaĵo, turnita sur la malalta herbo, havis fortegajn kolorojn kaj estis envolvita en akva saketo, branĉigita de verdaj kaj ruĝaj vejnetoj kiu finis en viola kordono tra kies pinto eliris fluaĵo malrapide. La ĉevalido estis jam tute farita. Li havis ruĝecbrunan hararon kaj grandan kapegon, kun okuloj eksterorbitaj kaj jam naskiĝintaj okulharoj; la ventron ŝveliĝinta kaj la kruojn fajnegaj, kiuj finis en hufoj el kartilago, ankoraŭ mola; la krinoj kaj la vosto flosis onde tra la muka fluaĵo de la sako, kiu estis kvazaŭ siropo. La ĉevalido estis tie kiel en fiŝvazo kaj li moviĝis svage. La ventokoko ŝiris la sakon per sia beko kaj la tuta akvo elverŝiĝis sur la herbo. La ĉevalido, kiu havis la grandon de kato, vekigis iom post iom kiel disstreĉante, kaj stariĝis. Liaj koloroj estis densaj kaj fortaj, neniam viditaj; la tuta koloro de la ĉevalino estis enirinta en tiun malgrandetan korpon. La ĉevalideto forsaltetis kaj iris serĉe de sia patrino. La ĉevalino kuŝiĝis por ke li mamsuĉu. Blankis la lakto en ŝiaj vitraj mamegoj. La infano kaj la ventokoko revenis hejmen. Ili kunportis la kuprajn marmitojn kaj eniris trabalkone. Poste ili metis la sangon en ĵarego kaj sigelis ĝin. La patrino pardonis sian filon; sed la infano diris ke li volas fariĝi remburisto kaj oni devis sendi lin kiel metilernanto ĉe majstro remburisto.

Jam la nebulo estis preninta koloron nigran ruĝecan kiu bendiĝis el blua. La aspra kaj moskaodoro estis transformante sin en alia pli leĝeraodoro, kvazaŭ de bestaj violoj. La lumo denove pliiĝis kaj la nebulo ekhavis koloron violecan, lilan, ĉar la bluaj bendoj estis fandiĝintaj kun la cetero. La humideco malpliiĝis kaj la nebulo heliĝis pli kaj pli. Laodoro je bestaj violoj iĝis pli kaj pli subtila kaj eĉ vegetala. La nebulo pliheliĝis ekhavante koloron rozbluecan, pli kaj pli helan, ĝis denove malfermiĝis kaj ĉio ekvidebliĝis. La ĉielo estis blanka kaj pura, kaj la aero havis parfumon je tiliteo kaj blankaj rozoj. Sube oni vidis la sunon kiu estis forironta kun siaj skarlataj kaj karminaj nubuloj. Malhelis. La tri marmitoj estis plenaj je densega sango, ruĝa, preskaŭ nigra. Ĝi bolis lante en grandaj, malrapidaj bobeloj kiuj eksplodis senbrue kiel kisoj de ronda buŝo.

III. KIEL LA INFANO IRIS AL GUADALAJARA KAJ NOMIĜIS ALFANHUÍ KAJ LA AFEROJ KAJ PERSONOJ KIUJ ESTIS EN LA HEJMO DE LIA MAJSTRO

En Guadalajara loĝis la remburista majstro. La infano iris al Guadalajara kaj serĉis lian hejmon. Li loĝis en senfenestra volba koridoro, lumigita per olelampoj kiuj pendis el la muroj. Laŭlonge de la tuta koridoro estis granda stablo kaj sur ĝi nenombreblaj iloj el fero, ligno kaj latuno. La koridoro havis du malaltajn pordojn kaj finis en oklatera salono, iel malgranda, kiu ricevis la lumon tra verda lukto kiu estis plafone.

La majstro rigardis la infanon elsupre malsupren per seriozegaj okuloj kaj diris:

- Vi? Vi havas flavajn okulojn kiel la trieloj; mi nomos vin Alfanhú ĉar tiu estas la nomo per kiu la trieloj krias unuj al aliaj. Ĉu vi havas sciojn pri koloroj?

- Jes.

- Kion vi scias?

La infano rakontis tion kion li estis farinta el la rusto de la lacertoj, sed li diris nenion pri la sango, ĉar la koko estis konsilinta lin ke li sekretu, ĉar estis li kiu la unua atingis tion.

- Tio bone aspektas.

Diris la majstro. La majstro malfermis unu el la pordoj. Aperis ĉambreto kun fenestreto fone el koloraj vitroj, malegale tranĉitaj kaj velditaj per stano. La murojn kovris ĝis mezalto paneloj el juglanda malhela ligno. La lito, alta kaj mallarĝa, havis kvar orkolorajn bulojn en la anguloj. Sur ĉiu bulo, po unu birdo; ĉekape merlo kaj meropo, dekstre kaj maldekstre; ĉepiede, numenio kaj vanelo. La tuta ĉambro havis multajn birdojn, ĉefe ardeon.



- Ĉi tie vi dormos.

Diris la majstro.

En la domo loĝis ankaŭ servistino, malhele vestita kaj kiu ne havis nomon ĉar ŝi estis surdmutulino. Ŝi moviĝis sur tabulo kun kvar lignaj radoj kaj ŝi estis remburita, sed ri-detis de tempo al tempo.

La domo havis ankaŭ ĝardeneton antaŭ la fasado kaj flanke. Separis ĝin el strato staris ligna barilo, malalta kaj verde farbita.

La majstro rakontadis historiojn nokte. Kiam li ekrakontis, la servistino konis ĉiujn historiojn kaj plivivigis la fajron kiam la historio kreskiĝis. Kiam ĝi monotonis, ŝi lasis ĝin langvori; en emociaj momentoj, ŝi denove aldonis brullignon en la fajron, ĝis la historio finis kaj ŝi lasis ĝin estingiĝi.

Unu nokton elĉerpiĝis la ligno antaŭ la fino de la historio, kaj la majstro ne povis plui.

- Pardonu, Alfanhú.

Diris kaj li iris al la lito. Li rakontis historiojn nur ĉe la fajro kaj apenaŭ li parolis dumtage.

Daŭrigota

LEVANTE

Blovas ventego tra miaj haroj... flugantaj sableroj vangofrapas min kaj kiel flugantaj kudriloj emas eniri miajn okulojn kaj orelojn. Mi enspiras pene kaj sableroj kune kun aero penetriĝas en miajn naztruojn... Mia vizaĝo estas malseka kaj sur la lipoj mi povas gustumi salan akvon kiun la orienta vento forportas okcidenten. Inter la maro kaj oceano kaj konfronte la iluzia pejzaĝo kiu apenaŭ videblas tra rapidege flugantaj nuboj... Ventego kaj Ondo harmonie muĝas... La vento "Levante" balaas la pintojn de ondoj kaj forŝprucas akverojn sur la ferdekojn de ŝipetoj vice atendantaj en la porto, sur la homojn kiuj kvazaŭ klinas sin malantaŭ ĝia forto kaj sur la aŭtomobilojn haltantajn sur unu linio preter la marbordo... la sableroj flugas tra la aero kaj ornamas malsekan surfacon de la aŭtomobiloj.

Ventego kaj pluvego ekkomencis de unu tago. Hieraŭ nokte mia amiko Carlos en sia poŝtelefono montris al mi filmeton. Grupo de homoj en drinkejo de kies plafono pluvakvo falis kiel duŝo sur ilia kapo drinkadis.... rara pluvego kaj malofita tiugrade forta vento. Kaj pluvego kaj ventego ĵus venis ĉi tien samtempe kun mi!

Ĉi tie kaj en proksimaj havenurboj ŝipoj nuligis siajn veturojn al alia flanko de la markolo ...Mi eniras en la fermatan havenon... dekoj da boatoj staras vice ŝnuritaj malantaŭ cementa barilo kiu savas ilin de altaj ondoj. La boatoj nur sialoke pendolas ien kaj reen kiel bebo en lulilo....



En la maldekstra flanko, la kastelo Guzman alte staras ĉe la maro kaj silente toleras la frapojn de vento kiujn ĝi spertas tra jarcentoj... En la koridoro de plej alta etaĝo de la turo la vento hurlante klakas la fenestrojn kaj pordojn fiksitaj per ĉenaroj Sur la pinto, kie iam gardistoj observis movojn de amikoj kaj malamikoj sur la maro kaj tero; mi devas klopodi ke la ventego ne forportu mian okulvitrojn de sur mia nazo... En la horizonto mi vane serĉas klaran spuron de Afriko pro kiu mi venis ĉi tien... nuboj fantome flugas super la maro malkaŝante la sunbrilon kaj ree daŭras sian movon kaŝante la sunajn radiojn kaj miraĵon de Afrika Saharo en horizonto...



Vibradon mi sentas en la pantalona poŝo. Tra hurlo de naturo mi ne aŭdas la ringon de la poŝtelefono. Malantaŭ la plafona pordo mi respondas la telefonon... mia patrino de Irano estas en alia flanko de linio...

-Panjo... atendu iom! Mi ne aŭdas vin!

Pordo bridita per peceto de ĉenaro kie malsupreniras la ŝtuparo helike klakas tiel brue ke mi apenaŭ aŭdas la voĉon.

- Kia bruo!!!Kie vi estas?

- Jen mi en la plej suda parto de kontinenta Hispanujo. Suda Andaluzio. Haveno Tarifa.

- Kie?

- Ĉe Ĝibraltara markolo. Hodiaŭ forte ventas ĉi tie... Mi krias.

-Ho! Ĝibraltaro! Zorgu vin mem... Poste kiam vi trovos pli kvietan lokon telefonu! Ŝi ankaŭ laŭte diras.

- Bone! Adiaŭ...

Kaj miaj elbuŝitaj silaboj perdiĝas inter hurlanta sala ventego de Ĝibraltara markolo kaj klakado de la plafon-pordo de supera etaĝo de Guzmán turo.

Saed Abbasi

La aŭtoro de ĉi poezia kaj tre interesa artikolo, vizitis Madridon, Malagon, Kordovon, Tarifon, ktp. Kaj kiel li diras, “ĉe Ĝibraltara markolo, Hodiaŭ forte ventas ĉi tie...” kaj li ne kapablis bone aŭdi kelkajn vortojn.

PRELEGO DE MATI MONTERO ELHISPANIGITA DE MIGUEL FERNÁNDEZ

Partopreno en la ronda tablo, per kiu oni inaŭguris la teatran ciklon “Paper-virinoj aŭ Virin-rola: monologoj far inaj fikci-personoj”, kunordigitan de Nuevo Teatro Fronterizo [Nova Teatro ĉe la Limo], kompanio de José Sanchis Sinisterra.

“Janis Joplin kaj Marjane Satrapi, verkistinoj pri marĝena literaturo aŭ sublitteraturoj: figuroj esencaj en la historio de la muziko kaj la komikso faritaj de virinoj”, aŭtorita de Mati Montero

(Dua parto)

Janis havis vivon de insekca tragedi-persono: kiom ajn ŝi batalis kontraŭ sian destinon, ŝajnis, ke fine ĉi tiu sin trudos al ŝi neeviteble. La kino, kiu kutime amas tiajn tragikajn personojn, portretis ŝin en la filmo *The rose* [La rozo], kie la aktorino Bette Middler ludas kantistinon, kiu estas la viva portreto de Janis. Por kompletigi la kinan esploron pri ŝia vivo, oni faris diversajn dokumentajn filmojn pri ŝi. Unu el ili estas ĵuse publikigita sub la titolo *Janis: little girl blue* [Janis: blua knabineto], elstare majstre reĝisorita de Amy Berg.



Por mi, la ĉeesto de Janis troviĝas ankaŭ en la literatura fikcio kiel unu el tiaj delogaj nimfoj tiel persekutataj de la artistoj, unu el tiaj miksaĵoj el la surrealistma frenezo de *Nadja* (André Breton) kaj la perverseco de *Lolita* (Nabokov). Ja, samkiel tiuj personoj, kaj eĉ pli, ŝi skandalis onin. Sen senti honton pri ajno de ŝi farata, sed sen firma lasta sav-tabulo: la muziko ne forigis ŝin disde ŝiaj timoj, kiam ŝi troviĝis sola. Malgraŭ sia granda talento kaj malgraŭ tio, ke kvalite ŝi larĝe superis la muzikistojn de siaj unuaj bandoj per sia voĉo disŝirita, aŭtenta, libera kaj profunda kaj per sia kliŝ-detrua stilo, ŝi ne povis venki sian tragikan destinon. Per tia marko de persona identeco havata de kiuj

scias priridi sin mem, ĉar jam nenio restas al ili, kaj konservas humoron ĝueman kaj diboĉeman, ŝi, per sia kontaĝa rido de maliceta knabino, plue mirblindigis la publikon kaj la artistojn, kiuj serĉas inspiron. Leonard Cohen estis unu el ĉi lastaj kaj, kiel omaĝon, li dediĉis al ŝi la subliman *Chelsea Hotel*, kanton, en kiu li parolas pri sia ama renkontiĝo kun Janis en fama nov-jorka hotelo, kien kutime iris la artistoj. Ili malbelas kaj tion scias kaj tion diras unu al la alia kaj amas unu la alian, ĉar tio oportunas tiumomente kaj en la mondo, kie ili vivas, ili bezonas unu la alian aŭ ne, aŭ jes, sed tio estas amo aŭ tia serĉado estis tio, kion ili rigardis amo aŭ sekso kun majuskloj.

Kaj dum Janis Joplin triumfadis en Woodstock kaj kantadis ebria kaj ŝanceliĝanta sursceneje, fronte al miloj da fanoj, en Irano naskiĝis la dua protagonistino de ĉi prelego: Marjane Satrapi, komiks-desegnistino, kiu mastras vinjet-arton kaj triumfis kiel Janis, ne sen sperti ĉagrenojn.

Marjane vivas en Parizo, kie ŝi trovis sian lokon en la mondo, gajnis la premion Anguleme, unu el la plej gravaj en la mondo de la komikso, per sia libro *Kokidaĵo kun rosinoj* kaj estas tutmonde konata per *Persepolo*. Ĉi tiu estas plurvoluma verko, kie, per membiografiaj trajtoj, ŝi rakontas pri la vivo de sia familio, pri la ricevita influoj, pri sia lernado kaj pri sia persona evoluo ekde sia infanaĝo en Irano, kadre de la ŝanĝoj spertataj en la lando laŭlonge de la 20a jarcento ekde la epoko de la ŝaho, la islama revolucio de Ĥomejni kaj la posta vivo de la aŭtorino: ŝi rakontas pri sia nelonga restado en Aŭstrio por fini siajn studojn, pri sia reveno en Iranon kaj pri la starigo de sia definitiva rezidejo en Parizo. Ŝia familio, kun progresema pensmaniero, suferas la ekpuŝegojn de la historiaj ŝanĝoj en la lando kaj definitive influas sur la junan Marjane, kiu kreskas kadre de racia kaj analiza pensado apogita sur justo, etiko kaj familia amo. Paradokse, la restado de la aŭtorino en Aŭstrio, ekzemplo de okcidenta socio demokratia kaj progresinta, ĵetas ŝin en inferon de malriĉo, alkoholo kaj drogoj, kie ĉirkaŭas ŝin soleco kaj marĝeniĝo. Temas pri situacio simila al tiu travivita de Janis, malgraŭ ŝiaj muzikaj sukcesoj.



Farinte ĉi etan omaĝon al eksterordinaraj virinoj, kiuj frontis la sociajn regulojn, virinoj, kiuj navigis en malamikaj mondoj kaj servis al multaj virinoj kiel sekvendaj modeloj aŭ montris al multaj virinoj vojon diferenca kaj aŭtentan, mi volus direkti min al la fino per lasta feminisma analizo, kiun mi rigardas esence konsiderinda. Ĝi rilatas al la kino. Ankaŭ tiun arton mi konsideras unu el la pluraj elementoj de la literatura kreo kaj, sekve, unu plia “subliteraturo”.

Tiucele, kaj sen eliri el la komikso farata de virinoj, mi klarigos, en kio konsistas la “Bechdel-testo”, kiu proponas serion da normoj pri spektado de kin-filmoj. Tiu testo aperis en la komika bild-strio *Unas lesbianas de cuidado* [Danĝeraj lesbianinoj], de Alice Bechdel, en Usono, en la okdekaj jaroj, sed la ideo, laŭ la aŭtorino, ŝprucis el legado de la verkoj de Virginia Woolf kaj dank’ al konversoj kun ŝia amikino Liz Wallace. La testo analizas la feminisman enhavon, la ĝenran starpunkton, de la kutime konsumataj kinaj filmoj. Ĝi enhavas certajn premisojn, kaj se filmo ne plenumas ilin, tio ŝuldiĝas al la fakto, ke ĝi prezentas virinajn stereotipojn konceptitajn tradiciaj kaj malmulte liberigaj. La postulatoj jenas: en la filmoj devas aperi almenaŭ du ineksaj personoj, tiuj personoj interparolas almenaŭ en iu difinita momento kaj tiu interparolo devas temi pri io diferenca disde viro. Tiu testo konas varianton, kiu, krome, postulas, ke la du virinoj estu personoj kun nomo.

Konklude, mirigas malkovri la grandan kvanton da filmoj, kiuj ne plenumas la kondiĉojn postulatajn de la testo. Se, male, oni aplikas la saman teston al la viroj, preskaŭ la tuto de la filmoj sukcese trapasas ĝin. Per tio oni konstatas, ke, spite la kliŝdetruajn modelojn, pri kiuj mi parolis al vi antaŭe, la mondo de la arto kaj la socio reproduktas plue virinajn modelojn malmulte validajn por la egaleco kaj la liberiĝo de la virino, kaj ke restas ankoraŭ longa vojo trairenda por atingi la totalan realan emancipiĝon de la virinoj.

(Fino de la prelego)

NOTO:

La pasintan semajnon, aperis dubligitaj du paragrafoj pri la jena artikolo, tre bone verkita de Miguel Fernández, mi senkulpigiĝas kaj kiel li saĝe diris al la Redakcio: “Vi nek forigis parton de la teksto nek enŝovis en ĝin erarojn, vi nur ripetis du alineojn. Ĉi tion la leganto povas kompreni. Mi esperas, kara leganto vian toleremon.

La Redakcio.



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO



76-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO TERUELO, 23-a de junio ĝis 25-a de junio 2017 ALIĜILO

Plenigu tiun ĉi aliĝilon, kaj sendu ĝin al la adreso kongreso@esperanto.es aŭ per poŝto al la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio (Rodríguez San Pedro, 13, ES-28015 Madrid). Oni ankaŭ povas uzi la formularon troveblan en la retejo <http://www.esperanto.es/kongreso/>

Persona nomo						
Familia(j) nomo(j)						
Adreso						
Urbo kaj provinco						
Retadreso						
Telefonnumero(j)		Membro de HEF?		<input type="checkbox"/>	Jes <input type="checkbox"/>	Ne <input type="checkbox"/>
Naskiĝdato (nur por statistiko aŭ rabato)						
Dato de pago (1)		Kategorio				
Kotizo		Donaco		Sumo		

KOTIZOJ

Bonvolu pagi la kotizon per enbankigo, nepre indikante “Kongreso” kaj vian nomon en la bankokonto de “Liberanimo” de la “Caja Rural de Teruel” ES28 3080 0001 8123 5515 9217. Eblas pagi rekte al HEF aŭ al Liberanimo; nepre klare informu la organizantojn en tiu kazo.

KATEGORIOJ	Aliĝo ĝis 31-01-2017 (1)	Inter 01-02-2017 kaj 30-04-2017	Post 01-05-2017 kaj surloka aliĝo
Membro de HEF aŭ Liberanimo	35 €	45 €	55 €
Ne membro de HEF	45 €	55 €	65 €
Juna membro de HEF aŭ Liberanimo (malpli ol 30) (2)	25 €	35 €	45 €
Junulo nemembranta en HEF (malpli ol 30)	30 €	40 €	50 €
La aliĝilo estas senpaga por nepraj akompanantoj de handikapuloj kaj naskiĝintoj post 31-12-1996. Se vi volas partopreni la kongreson, sed vi havas ian malfacilaĵon, bonvolu kontakti la organizantojn			

(1) La efektiva dato estos tiu de ricevo de pago

(2) Sama rabato estas aplikebla al lernantoj de Esperanto ĉeestantaj kursojn organizitajn de grupoj aligitaj al HEF, komenciĝintajn inter septembro 2016 kaj aprilo 2017

Noto pri personaj informoj: Via nomo kaj devenloko aperos en reta listo de aliĝintoj kaj en kongreslibro. Vi rajtas sugesti la manieron sub kiu ĝi aperu.

Oni planas havigi liston de nomoj kaj retadresoj al ĉiuj kongresanoj, sed vi rajtas peti ke vi ne aperu en tiu listo. Ceteraj informoj estos arkivataj ĉe HEF kaj utiligataj nur por internaj celoj.